

ESPERANTO - ĈOKOLADA LINGVO

Doron Modan skribis leteron al la mondfama, svisa ĉokolado-fabrika "Toblerone":

Kara Sinjoro/Sinjorino

Mi tre ŝatas vian ĉokoladon, mi vizitis vian hejmpaĝon kaj legis, ke Toblerone etas vendita en 110 landoj. Tiu donis al mi ideon, kiu ŝajnas esti taŭga, sed verŝajne ĝi povas helpi por varbi pri via produkto. La 110 landoj, kie Toblerone etas vendata, estas preskaŭ 110 landoj, kie la internacia lingvo, Esperanto etas parolata. Se vi skribas la ingrediencojn de la varo en pluraj lingvoj kaj en la loka lingvo, kial ne indiku ingrediencojn ankaŭ ankaŭ en Esperanto? Ĉar Esperanto etas parolata en plimulto de tiuj landoj, escepte de kelkaj.

Mi faris etan enketadon al miaj geamikoj, kiuj parolas Esperanton demandante: "Se vi vidus ĉokoladon, sur kiu ingrediencoj etus skribitaj en Esperanto, kvankam vi ne manĝus ĝin, ĉu vi aĉetus ĝin?" La respondo estis ĉiukaze nepre "Jes!", ĉar malantaŭ la aĉetado staras solidareco al la ŝatata lingvo kaj ideo.

Tio ne nur plialtigus viajn vendojn, sed ankaŭ plifortigus la bildon de Toblerone kiel tutmonde ŝatata ĉok-

olado. Ĉu vi povas perdi ion aldonante ankoraŭ unu lingvon?

Esperante, ke vi etas malfermitaj al tiu ĉi ideo, sincere:

Doron Modan

Rete: esperanto_jeli@hotmail.com
Ŝi ricevis la respondon:

Kara sinjoro,

Multan dankon pro via letero proponante al ni aldoni E-on al la pakajo de Toblerone. Efektive, tio etas bonega ideo... kiun nia fabrikejo jam havis antaŭ longega tempo, kiel vi vidas sur la aldonata kopio de reklamo kiu datiĝas de 1920! Pro diversaj kialoj tiu

lingvo estis forlasita. Multan dankon denove pro via interesiĝo.

Elisabeth Misteli

Ni petas vin, ke vi skribu leterojn al la fabrika petante la aperigon de la informoj sur la ĉokolado ankaŭ en Esperanto. Ĉiuj leteroj etas bonvenaj ĉe:

Elisabeth Misteli

Communication Manager
Kraft Foods Schweiz AG,
Confectionery Plant
Riedbachstrasse 150-151,
CH-3027 Bern-Bruennen, Svisio
Rete: EMisteli@krafteuropa.com



IĜU B-KOMITATANOJ DE TEJO

La limdato por sendo de kandidatiĝoj estis novfiksita al la 31-a de majo 2002 anstataŭ la antaŭe anoncita 31-a de marto.

Dezirantoj iĝi komitatanoj B de TEJO bv. sendi leterojn indikante:

personajn datumojn (nomon, naskiĝdaton, retan kaj poŝtan adresojn, telefonnumeron);

biografion kaj priskribon de viaj celoj en la movado (maks. 100 vortoj);

subtenajn leterojn aŭ subskribojn de min. kvin individuaj membroj de TEJO el min. du landoj.

La leteroj devas alveni plej laste ĝis la 31-an de majo 2002 al:

TEJO

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015
BJ Rotterdam, Nederlando
Rete: ghen.sek@tejo.org

AMIKECA RETO 2002-2003

Aperis la nova eldono Amikeca Reto 2002-2003 kun pli ol 400 adresoj en 54 landoj. Novaj celolandoj aperas en la katalogo kiel Aŭstrio, Urugvajo aŭ Filipinoj. Estas notinde la forta apero de afrikaj landoj kiel Ganao, Togolando kaj Senegalio. La adresaro etas akirebla ĉe kutimaj libroservoj kaj ĉe la perantoj de Amikeca Reto kontraŭ 10 Eŭroj.

Pliaj informoj ĉe:

Amikeca Reto

88, rue Victor Hugo

FR-37400 Amboisek, Francio

Rete: a.reto

@france-association.com

NACIA NOVAĴAGENTEJO PRI ESPERANTO EN BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, pere de sia sekcio pri komunikado, kreis novaĵagentojn por liveri informojn pri Esperanto al ĉiuj ĵurnaloj, revuoj, radi- kaj televid-satacioj en Brazilio. Komence oni limigas sin al ĵurnaloj, kaj post la prilaborado de adresoj oni etendigas ĝin al revuoj, radi- kaj televid-stacioj. La informoj etas dissenditaj nur al la periodaĵoj havantaj elektronikan adreson.

Brazila E-Ligo

Rete: bel@esperanto.org.br

Eventa ludkvizo

Ekde la sekva numero de Eventoj nia intelekta ludo estos daŭrigata!

Ni invitas VIN,
ludu kun ni!

UEA PLENDAS KONTRAŬ LINGVA DISKRIMINACIO

UEA plendas ĉe Eŭropa mediatro Jacob Soderman kontraŭ lingva diskriminacio en internaciaj organizoj

Eŭropaj organizoj rezervas pli kaj pli da postenoj, oficiale malfermitaj al ĉiuj civitanoj, al denaskaj parolantoj de la angla. Nur tiuj homoj, kiuj denaske scipovas la anglan, ĉu apartenantaj al sociaj elitoj, ĉu apartenantaj al anglalingvaj nacioj kaj landoj, povas kandidatiĝi por multaj postenoj Eŭropaj kaj en internaciaj organizoj. "Ni nun havas liston de 400 diskriminaciaj dunganoncoj fare de Eŭropaj organizoj kaj firmaoj en Bruselo. En la tuta mondo estas multe pli da tiaspecaj anoncoj," klarigas Renato Corsetti (la prezidanto de UEA).

Eŭropa Komisiono agnoskas la juran problemon. "Postuli denaskan scipovon de la angla povas esti konsiderata kiel diskriminacia," opinias Anna Diamantopoulou, membro de Eŭropa Komisiono respondeca pri laboro kaj egalaj ŝancoj. Respondante al demando de itala Eŭropa parlamentano Vitaliano Gemelli, ankaŭ membro de Eŭropa Komisiono Viviane Reding, respondeca pri kulturo kaj edukado, agnoskis kazon de lingva diskriminacio ĉe la Komisiona oficejo por la Eŭropa programo Sokrates, Leonardo kaj Junularo. Laŭ UEA lingva diskriminacio estas grava atako kontraŭ la dua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

UEA bedaŭras ke Eŭropa Komisiono ĝis nun oficiale nur agnoskas respondecon por Teknikaj Helpoficejoj, organizoj rekte dependaj de la Komisiono. "Tamen Eŭropa Komisiono financas amason da Eŭropaj organizoj kiuj regule dunganoncas nur por denaskaj parolantoj de la angla." Ekde du jaroj, UEA kune kun Eŭropa Esperanto-Unio (www.lingvo.org) sekvas lingvan diskriminacion ĉe internaciaj organizoj kaj firmaoj. Multaj dunganoncoj por

denaskaj parolantoj de la angla estas faritaj de Eŭropaj organizoj financitaj plene aŭ parte de Eŭropa Komisiono. Preskaŭ neniam aperas dunganoncoj por denaskaj parolantoj de aliaj lingvoj.

"Spite al multaj neoficialaj plendoj en la Eŭropa Parlamento, Eŭropa Komisiono ankoraŭ financas amason de Eŭropaj organizoj en Bruselo, kiuj rezervas postenojn por denaskaj parolantoj de la angla," diras Corsetti. "Ekde la komenco de la jaro kvindekdeko de gravaj Eŭropaj organizoj rezervis postenojn por denaskaj parolantoj de la angla. Inter ili estas eĉ oficiala servo de Eŭropa Komisiono - la projekto "Jean Monnet" kiu promocias la Eŭropan "spiriton" ĉe universitatoj."

Pasintjare, dum la Eŭropa Jaro de Lingvoj, klare sonis kondamnoj de lingva diskriminacio, interalie de la belga ministrino Laurette Onkelinx, respondeca pri egalŝancoj, kaj diversaj anoj de Eŭropa Komisiono (listo de parlamentaj demandoj). Tamen la praktiko daŭras en 2002 kaj Eŭropa Komisiono daŭre financas tiajn organizojn en Bruselo, kiuj rezervas postenojn por denaskaj parolantoj de la angla. Nun la prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, prof. Renato Corsetti oficiale plendas pri lingva diskriminacio al la Eŭropa Mediatro, Jacob Soderman (www.euro-ombudsman.eu.int). "La ĉefa celo de la oficiala plendo estas kontraŭi diskriminacion surbaze de la denaska lingvo fare de internaciaj organizoj, t.e. la postulo ke kandidatoj denaske scipovu la anglan."

"Multaj politikistoj ne volas neŭtralajn kaj egalajn solvojn kiel, ekzemple, Esperanton. Tamen ili devas respondi al kaj respondeci pri la kreskanta problemo de lingva diskriminacio kontraŭ nendenaskaj parolantoj de la angla," klarigas Corsetti. Li tute ne estas kontenta ankaŭ pri la lasta respondo E-3572/01 de Anna Diamantopoulou, ano de Eŭropa Komisiono respondeca pri sociaj aferoj. "Ŝi nun permesas al Eŭropaj organizoj postuli

"English mother tongue or equivalent" (La angla denaske aŭ samnivele). Kompreneble, tio estas la samo kaj fakte signifas, ke Eŭropaj organizoj nun nur invitos denaskajn parolantojn de la angla."

La plendo pri lingva diskriminacio fare de Universala Esperanto-Asocio celas ke la Eŭropa Komisiono:

- 1) agnosku la diskriminacian naturon de diverstipaj dunganoncoj, kiuj estas oficiale malfermitaj al ĉiuj civitanoj, sed neoficiale rezervataj al denaskaj parolantoj de la angla ["English mother tongue", "English native speaker", "English mother tongue or equivalent", ktp].
- 2) certigu ke ĝi ne plu financos tiujn organizojn kaj firmaojn, kiuj diskriminacias kontraŭ nendenaskaj parolantoj de la angla.
- 3) studu kaj esploru rimedojn kaj metodojn eviti lingvan diskriminacion fare de organizoj plene kaj parte financitaj de ĝi.

La oficiala plendo ĉe la Eŭropa Mediatro rilatas nur al tiuj dunganoncoj, kiuj postulas denaskan scipovon de la angla. "Tamen eĉ pli da Eŭropaj organizoj, kaj centoj da firmaoj laborante kun Eŭropa Komisiono en Bruselo, postulas "perfektan" scipovon de la angla kaj poste nur invitas denaskajn parolantojn de la lingvo de Ŝekspiro," klarigas Corsetti. Eŭropa Komisiono ankoraŭ insistas ke lingva diskriminacio fare de Eŭropaj organizoj, eĉ se plene financataj de Eŭropa Komisiono, estas "nur" belga problemo pro tio ke Eŭropaj organizoj kaj firmaoj estas konstituitaj laŭ belgaj leĝoj.

"Oficistoj ĉe Eŭropa Komisiono bone komprenas ke belgaj inspektoroj havas nek monon nek tempon por solvi la problemon de lingva diskriminacio fare de Eŭropaj organizoj en Bruselo."

*Dafydd ap Fergus,
Komunikadcentro de
Eŭropa Esperanto-Unio
Rete: kontakto@lingvo.org*

Ret-Info:
www.eventoj.hu




ARANĜOJ

ASTRONOMIA ESPERANTO-STAĜO

La 3-a Staĝo "Astronomio: amatoroj kontribuas" de Astronomia Esperanto-Klubo, inter 07-14. 09. 2002, en Sankt-Mikaela Observatorio, suda Francio. La aranĝon organizas Astronomia Esperanto-Klubo, AEK, kiu estis fondita komence de 2000. La staĝo celas eduki la pli vastan Esperanto-publikon pri la plej antikva scienco - Astronomio.

En la Observatorio funkcias Centro de Astronomio, kiu regule or-

ganizas diversnivelajn staĝojn, akceptas grupojn el diversaj regionoj de Francio, okazigas konferencojn kaj faman someran Astronomian Festivalon. En la Centro disponeblas la plej unika speciala teleskopo en Eŭropo por observadi la Sunon.



Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

Astronomia Esperanto-Klubo
J. C. Rapley
2 rue du Stade
FR-86410 Bouresse, Francio
Rete: astroek@yahoo.com
www.esperanto.org/AEK

FERIO EN BRETONIO

En aŭgusto 2002 okazas en Bretonio, Francio, en Plouezec pluraj interesaj Esperanto-aranĝoj, kie estas atendataj ankaŭ eksterlandanoj el la tuta mondo. Oni povas profundigi sian Esperanto-scion, -kulturon. Okazas ekskursoj kaj diversaj amuzigaj programeroj.

Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

Esperanto 22
4. route de Kervor
FR-22470 Plouezec, Francio
Rete: esperanto.22@libertysurf.fr

IKEF-KONGRESO

Inter 01-07. 06. 2002. okazas la 54-a Kongreso de Internacia Komerca Esperanto-Fakgrupo, IKEF en Plovdiv, Bulgario. La programo enhavas altnivelajn, fakajn erojn. Kompreneble okazas ankaŭ ripozo, amuziĝo, ekskursoj kaj aliaj etosigaj programeroj.


Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe:

Roland Rotsaert
Visspaanstr. 97.
BE 8000 Brugge, Belgio
Rete: rotsaert@esperanto.be

KARAVANO DE IJK AL UK

Grupo da junaj brazilanoj decidis kune veturi de Pato Branco, urbo kiu gastigos la 58-an IJK-n de TEJO, al Fortoleza, kongresurbo de la 87-a UK. Por ĝui tutan semajnon da E-kunvivado kaj ekkoni grandan parton de orienta Brazilio, ili decidis tion fari en sestaga aŭtobusa karavano. Junaj kaj nejunaj geesperantistoj partoprenos, kiel tradicie en la brazila E-movado, kaj pliaj estas invitataj.

La veturado okazos plejparte



nokte, en ekskluziva kaj komforta buso je litecaj seĝoj. Dumtage la buso kondukos la karavananojn en siaj vizitoj al kvin interesaj urboj Curitiba, Rio de Janeiro, Porto Seguro, Salvador, Recife. La programo okazas en Esperanto. De Pato Branco oni ekveturos dimanĉe, la 28-an de julio, kaj al Fortaleza oni alvenos matene de sabato, la 3-an de aŭgusto, antaŭtago de la solena malfermo de UK.

Pliaj informoj ĉe:

James Rezende Piton
Rete: james.piton@iname.com

Kompleta monata kalendaro

La kompleta jara listo de E-aranĝoj daŭre aktualigata de ni, troveblas en interreto <http://www.eventoj.hu>. Korektoj, aldonoj estas bonvenaj! Por ricevi txt-formatan version sendu mesaĝon (enhavo ne gravas) al la aŭtomato: kalendaro@esperanto.org

- 01.06.** 5-a Kongreso de Kroataj Esperantistoj, Rijeka. Inf: Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385-1-4617550, fakso +385-1-4619373. Rete: esperanto@zg.tel.hr
- 01-02.06.** Esperanto-Renkontiĝo "Festo de la Rozoj", Karlovo. Inf: B. Leonov, Esperinform, p. k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario. Tel: +359-335-3933. Rete: leonov@rozabg.com
- 01-07.06.** 54-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio en Plovdiv. Inf: 54-a Kongreso de IFEF, Centra Poŝto, p.k. 455, BG-4000 Plovdiv, Bulgario. Tel: +359-32-267912, +359-32-441437, fakso: +359-29-874541. Rete: bdz-intrel@bbf.bg
- 01-08.06.** Ferio-semajno "Rozo-2002", Karlovo. Inf: B. Leonov, Esperinform, p. k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario. Tel: +359-335-3933. Rete: leonov@rozabg.com
- 02-04.06.** Religia Turismo - mondkonata Pentekosto en Miercurea-Ciuc (Csíkszereda). Inf: Jolanda Józsi, str. Brinduselor 92 bl. 41A sc.C ap33, et.8, RO-2200 Braşov, Rumanio.
- 06-12.06.** Postkongreso Nesebar. Inf: 54-a Kongreso de IFEF, Centra Poŝto, p.k. 455, BG-4000 Plovdiv, Bulgario. Tel: +359-32-267912, +359-32-441437, fakso: +359-29-874541. Rete: bdz-intrel@bbf.bg
- 08-16.06.** 24-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno. Inf: Pola Esperanto-Asocio, skr. 30, PL-75-016 Koszalin, Pollando. Tel: +48-094-3404563 (petu s-ron Baranowski)
- 11-16.06.** Ekoturisma renkontiĝo en Kvilda, Ŝumava-montaro, Ĉeĥio.. Inf: Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobrichovice, Ĉeĥio. Tel.: +420-2-9912201, fakso: +420-2-9912126. Rete: chrdle@kava-pech.cz
- 12-19.06.** 12-a Eŭropa Esperanto-Forumo, 2-a Internacia Seminario por Eŭropa Integriĝo, Buselo. Inf: Marcel Delforge, 16 rue des Glacières, BE-6001 Charleroi, Belgio.
- 14-16.06.** Turisma Renkontiĝo en Plasy (norde de Plzen). Inf: Václav Kaprál, CZ-331 51 Kaznejov 252, Ĉeĥio.
- 15-22.06.** Folkloraj Renkontiĝoj, Ŝakturniro en Ŝibenska Rogoznica. Inf: Zelimir Pehar, 14 Boronia Av., Dandenong North, Vic. 3175, Aŭstralio. Tel: +61-3-97130011. Rete: zpehar@yahoo.com
- 17-23.06.** Surmara turismado en Constanta. Inf: Jolanda Józsi, str. Brinduselor 92 bl. 41A sc.C ap33, et.8, RO-2200 Braşov, Rumanio.
- 18-22.06.** Altnivela lingvokurso kun muziko en Bouresse. Inf: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel/faksilo: +33-(0)549428074. Rete: kvinpetalo@club-internet.fr

FAKA APLIKADO

NOVA DOCENTO PRI INTERLINGVISTIKO KAJ E-O

La Universitato de Amsterdamo elektis Wim Jansen docento pri "Interlingvistiko kaj Esperanto", postsekretario de eksterordinara profesoro Marc van Oostendorp, kiu forlasis la katedron en 2001. La

nomumo validas de la 1-a de februaro 2002. Estas formala enfakultata tasko por unu kaj duona tagoj ĉiusemajne. La lekciprogramo pri Interlingvistiko kaj Esperanto kiel libere elektebla fako ene de la subfakultato pri teoria lingvistiko komenciĝos en septembro 2002 kaj daŭros dum la unua semestro de 2002-2003.

Hans Erasmus

Rete: erasmusz@worldonline.nl

INTERRETO

FILATELIA EKSPOZICIO

Ĉe la retpaĝo <http://www.abelo.supereva.it/esperanto.html> estas trovebla dulingva (itala kaj E-a) 60 paĝa ekspozicio de Esperantaj filatelajoj.

Alessandro Belluci

Via delle Formiche 7

IT-58043 Castiglione Della Pescaia

Grosetto, Italio

Rete: abelo@grifonline.it

FAMA, MULTLINGVA LIGOKOLEKTO EN ESPERANTO

En 2001 la retejo de Sveda Esperanto-Federacio registris 1.037.966 vizitojn. Plejmulto de ili vizitis la "Kiosko"-n (kolektejo de ĉiulingvaj gazetoj kaj magazenoj en interreto). Estas gratulinde la agado de la asocio (kaj la ret-aministranto Franko Luin) kiuj tre lerte propagandas Esperanton ankaŭ en la svedlingvaj retpaĝoj!

el Ret-Info

ATEISTOJ EN ESPERANTO

La Unio de Raciismaj Ateistoj kaj Agnostistoj, UAAR, laboranta por la re-samrajtigo de nekredantoj, aperigas siajn retpaĝojn en pluraj lingvoj, inter ili ankaŭ en Esperanto, kion ili volonte utiligas por la internaciaj kontaktoj. La paĝo troviĝas ĉe: <http://www.uaar.it/uaar/esperanto.htm>

laŭ Ret-Info

KONTAKTO SERĈATA

KONCERTO DE ASORTI - ĈU ĈE VI?

La Esperanta muzikensemblo "Asorti" (plurfoje koncertinta en internaciaj E-aranĝoj, UK-j ktp.) krom la muzikado en Litovio funkciigas ankaŭ son- kaj telestudion.

Nun en tiu ĉi somero ili ŝatus fari

someran rondvojaĝon tra Eŭropaj landoj kun celo fari retan video-prezentadon pri Esperantaj lokoj! Por tio ili uzas porteblan videostudion. La ensemblo pretas ankaŭ fari koncertojn - laŭ interkonsento.

Pli detalaj informoj ĉe:

Asorti Edvardas Pishchikas,

Elena Pishchikiene

Draugystes 1-28

LT-4761 Visaginas, Litovio

Rete: asorti@tts.lt

SKOLTOJ SERĈAS KUNLABORANTOJN!

Skolta Esperanto-Ligo, SEL serĉas novan redaktor(in)on por la liga revuo La Skolta Mondo. Same oni serĉas helpantojn por pligrandigi kaj plibonigi la Ligon. Oni urĝe bezonas "novan sangon" por revigligi SEL-on.

Interesiĝantoj kontaktu:

Hector Campos Grez

Pk. 231

CL-334-000-0 Curico', Ĉilio

Rete: esperanto@terra.cl

Lingvaj Festivaloj

VOLONTULOJ SERĈATAJ!

Serĉatas kunlaborantoj por aranĝi retpaĝojn pri Lingvaj Festivaloj, unu el la plej grandaj projektoj de Tutmonda Esperanto Junulara Organizo, TEJO kaj por traduki ties enhavon en la anglan kaj la francan.

Estas atendataj ankaŭ volontuloj por organizi lingvajn festivalojn.

Interesiĝantoj helpi bv. kontakti:

Ekaterina Jevlampieva

Rete: kat-jevl@cbx.ru

En Luksemburgio troviĝas firmao kiu vendas kafon kun la marko "Bongusto". Retpaĝo ĉe: <http://www.menuff.com>.

La retpaĝo pri ICQ-listo Esperanto denove (eĉ renovigite) funkcias. Ĝi ne nur donas informon pri la uzantoj de la servo ICQ sed ebligas ankaŭ la aliĝon al la listo. Bv. viziti: <http://esperanto.digiweb.com.br/icq/icqlisto.htm>.

Ĉe <http://mpovorin.narod.ru/kantaliaj.html> estas trovebla E-a karaokeo.

La galerio de pentraĵoj de la rusa pentristo, filozofa, sciencisto Nikolaj Rerih troveblas ĉe <http://www.roerich.ee/nr> kaj havas ankaŭ Esperantan parton.

Retpaĝo pri titoloj de mankolisto de Esperanto-bibliotekoj troviĝas ĉe: <http://www.xs4all.be/~rotsaert/bib/>.

La rusa, landa retlisto "reu-aktivuloj" ĉe yahoogroups.com estas renomita al "reu-agado".

La plurlingva senpaga E-programo, La Vortaro de B. Vivier kompletigis per la pola versio danke al la kunlaboro de Witold Czerwinski (Vito Redsky). Gratulojn! Retpaĝejo de "La Vortaro": <http://la-vortaro.net>.

Interesa retejo troviĝas ĉe: <http://www.eurplace.org/babel/index.html> - kie inter alie oni povas trovi dudekon da Esperanta traduko de konataj kanzonoj.

Estas starigita forumo pri vivo sen manĝado. La foruma retligo estas: <http://livingonlight.org/cgi-bin/YaBB-en/YaBB.pl> tie rigardu al: "Salono Vivo en Lumo en Esperanto".

MOVADO

JACQUES CHIRAC PRI ESPERANTO

La 15-an de aprilo 2002 Jacques Chirac prezidento de Francio skribis jenon al Vincent Charlot, konata franca esperantisto:

Kara Sinjoro,

Vi bonvolis altiri mian atenton pri la problemo de Esperanto, kaj mi dankas vin pro tio ĉar, kiel vi jam scias, temas pri afero pri kiu mi estas sincere favora.

Eĉ se pro kialoj kiujn vi facile komprenos, mi deziras antaŭ ĉio min dediĉi al la defendo de la francparolantaro, mi havas profundan simpatian por Esperanto kaj la humanista projekto kiu direktis ĝian kreigon kaj kiu pli ol iam ajn animas ĝiajn hodiaŭajn defendantojn.

Mi opinias miaflanke, ke la progresado de Esperanto, en la respekto de la kultura diverseco, kiu estas nedisigebla de ĝi, estus potenca faktoro de harmonio kaj kompreniĝo inter la popoloj.

Estas tute sendube ke, se la sorto de la urnoj estos al mi favora, mi submetos al la venonta registaro, kaj aparte al la ministro de la nacia Edukado, la demandon pri ĝia inkludado



kiel elektebla lernobjekto en la abiturienta ekzameno, aparte pro la deziroj esprimitaj fare de la gelemantoj kaj gepatroj, kaj pri la ebleco varbi sufiĉe da kompetentaj ekzamenantoj.

Mi petas vin kredi, Kara Sinjoro, je la esprimo de miaj plej bonaj sentoj.

aparte al la ministro de la nacia Edukado, la demandon pri ĝia inkludado

Plej kore
Jacques Chirac

MALFERMA TAGO EN CO DE UEA!

En la Centra Oficejo 27. 04. 2002 estis akceptita 62 esperantistoj. La nova direktoro Trevor Steele havis kiel prelegogastojn i.a. David Ferguson, kiu parolis pri la brusela komunikadcentro kaj lingvopolitiko, kaj mag. Herbert Mayer el Vieno. Mayer de Internacia Esperanto-Muzeo parolis i.a. pri ĝia eldonado. Cetere oni montris novajn videofilmojn de Roman Dobrzinski.

el Nun

GRANDA VARBADO KAJ ESPERANTO

Dum la tuta februaro 2002 sur 400 eksteraj tabuloj en la plej grandaj polaj urboj oni prezentis afiŝon de Paulina Orłowska titolitan "Ĉu vi parolas Espernton?" La verkon oni vidigos ankaŭ sur 30 mil senpagaj poŝtaj bildkartoj distribuotaj en publikaj lokoj.

Silezia Esperanto-Asocio
Str. Dubois 3/1

PL 50-208 Wrocław, Polio
rete: vroclavo@poczta.onet.pl


HUNGARA MOVADO DAŬRE DISPARTIGITA

La 27-an de aprilo okazis reelektita asembleo de Hungaria Esperanto-Asocio, kie krom unu membro estis reelektita la antaŭa estraro.

Oszkár Princz la ĝisnuna sekretario malgraŭ siaj antaŭaj deklaroj kaj la anticipaj interkonsentoj tamen ne retiriĝis.

La hungaria movado daŭre restas

dispartigita. En Budapeŝto ekzistas 2 movadaj centroj: tiu de HEA kaj



de Budapeŝta E-Domo. En ĉi lasta rezidas Kultura E-Asocio, la redakcioj de Eventoj kaj

R e t - I n f o ,
Fondaĵo Esperanto kaj Hungaria E-Junularo (landa sekcio de TEJO).

László Szilvási

Rete: szilvasi@eventoj.hu

NOVA OFICISTO EN LA CENTRA OFICEJO

La 32-jara Joost Witteveen el Nederlando eniris la teamon de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO en Roterdamo. Joost estas doktoro pri fiziko kaj sperta komputilisto; lia tasko estas prizorgi kaj modernigi la komputilaron.

el TEJO-Aktuale

ESPERANTO-BIBLIOTEKO POR PUBLIKO

Kolekto de pli ol 40 000 Esperanto-libroj de Károly Fajsz estis malfermita por la tuta publiko en biblioteko en Budapeŝto, Hungario. Ĉiuj povas foliumi Esperanto-librojn en la Nacia Biblioteko de Malnovaj Libroj. La katalogo estas publikigota ankaŭ en interreto.

Pri la okazaĵo aperis artikolo ankaŭ en Associated Press la 11-an de aprilo.

laŭ Daffydd ap Fergus

ESPERANTO-MONUMENTO, -PLACO, -KAFEJO!

Indas foje fari ekskursan viziton al ZEO-j en Graz, Aŭstrio. Ne estas vaste konate, ke urbocentre en la Placo Esperanto staras la Jubilea Monumento de E-o (Paul Neergaard, 1987), kaj tuj flanke malfermiĝis ankaŭ "Kafejo Esperanto".

INTERVJUO EN LA SLOVAKA TELEVIDO


La tutlanda slovak inform TV-kanalo TA3 (simila al CNN) faris intervjuon kun Stano Marček, redaktoro de la revuo Esperanto, pri niaj lingvo kaj movado. Ĝi estis elsendata la 14-an de aprilo, 85-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof, ĉiun duonhoron, dum la tuta tago, enkadre de la ripetataj TV-novaĵoj.

el [esper-inform]

MUZIKO

VERDSTELAJ BRAZILAĴOJ

Aperis albumo de brazila Esperanto-kantisto Tarcísio Lima kun la titolo Verd-stelaj Brazilajoj. Temas pri 13 originalaj, famaj, brazilaj kantoj prezentitaj kun bela akustika muziko en la Internacia Lingvo, Esperanto. La albumon eldonis Universala Esperanto-



Asocio, UEA kaj Brazila Esperanto-Ligo, BEL. Oni povas aŭskulti kanton pri "Ĉio dolor", kaj pri "Kara kor" sed ankaŭ aliaj gravaj aferoj, demandoj de la vivo estas pri-traktataj en kantoj. La disko estas mendebla ĉe la grandaj libroservoj i. a. ĉe:

*Libroservo de UEA
Niuwe Binnenweg 176.
NL-3015 BJ Rotterdam,
Nederlando*

Rete: libroservo@co.uea.org

REAGIOJ

KIAL TEMIS (ANKAŬ) PRI ARGENTINO?

En historio de juda popolo estis decidaj jaroj la antaŭa jarcentŝanĝo. En la historio ludis grandan rolon d-ro Teodoro Herzl, la kreinto de internacia cionisma movado.

Teodoro Herzl naskiĝis en Budapeŝto. Li doktoriĝis pri juro, sed la nigran talaron li forlasis kaj fariĝis ĵurnalisto. Li vojaĝis multe kaj sendis raportojn al gazetoj, en Vieno kaj Berlino teatroj ludis liajn teatraĵojn. Onidire li estis okulfrappe impona viro kaj vivis belan senzorgan vivon. Ĝis ekplodis Dreyfuss-proceso, kiu funde ŝanĝis ankaŭ lian vivon. Li konsciigis pri la malamego, kiun la judoj spertas vidante sur starto kontraŭjudajn manifestojn. Ŝokis lin la fakto, ke li aŭdis kontraŭjudajn elkriojn el tiu lando, kie la judoj ricevis nelimigitajn rajtojn jam antaŭ unu jarcento.

Tiam li ekagis. Li ekverkis la libron, kiu fariĝis vojmontrilo kaj funda dokumento por 15 milionoj judoj: "La Juda Ŝtato". La libro aperis en 1896. Por realigi la revon li bezonis apogon de riĉaj homoj. Li komencis persvadi riĉajn kaj potencajn judojn, kun malmulta rezulto. Por riĉuloj ne estis tro alloga rekomenci la vivon en dezerto de Palestino, fari ion el nenio. La pariza, berlina, londona kaj viena ĉefrabenoj, eĉ la riĉa barono Hirsch, kiu aĉetis terojn en Argentino por la malriĉuloj por ebligi al ili memstaran vivon, rifuzis la helpon. La juda ruĉularo akuzis lin falsa

Mesio. Por rebati la akuzojn kaj fari organizojn, Herzl kunvokis kongreson. Tiu kongreso estis la unua okazo, ke al ĉiuj partoj de la mondo dispelita popolo renkontis.

La eho de la evento estis grandega. Kiel komisiito de la kongreso, Herzl jam povis realigi kontaktojn al diplomaciaj kanaloj. Sed la politiko neniam estis io bonfara organizaĵo. La helpo dependas ĉiam de la intresoj. Germanio, Britio, Turkio... kun kunplektiĝo da diversaj interesoj. La germana Vilhelmo la 2-a intervenas por Herzl ĉe turkoj. Turka sultano eĉ ne konsideras Palestinon, li proponas alian teritorion en Malgranda Azio. En Egipto plena rifuzo. Proponoj de potenculoj por la nova patrujo malsamis ol Palestino. Li vojaĝas de reĝo al reĝo, eĉ al la papo, el unu lando al alia. Dum la sesa kongreso s-ro Herzl devas elteni riproĉojn, ke anstataŭ la Promesita Tero li proponas afrikan stepon aŭ transmaran landon. Ili ĵuris iri nur al Jerusalemo.

D-ro Teodoro Herzl vekis popolon, montris al ili eliron el plurjarmila sufero. Ekde la apero de lia verko La Juda Ŝtato la tuta judaro parolis pri la nova patrio. Ĉu estas mirinde, ke ankaŭ Zamenhof mencias unu el la eblaj lokoj de lando de judoj - el kiuj plej konkreta en 1901 estis

Argentino? Des pli, ke li konsciis pri la lingva faceto de tia komunumo, kiu kolektiĝas el ĉiuj partoj de la mondo. Estas tute kompreneble, ke Zamenhof pensis pri nova lingvo de sia popolo.

István Mészáros

P.S. D-ro Teodoro Herzl: La Juda Ŝtato, 1934. eld. Literatura Mondo, Budapeŝto

FLEGISTINO SERĜATA!

Por parttempa flegado kaj var-tado de miaj malsanaj gepatroj mi serĉas findindan helpantinton por certa tempo laŭ interkonsento. Ĉambro kun duŝo kaj necesejo estas disponebla. Esperanto-biblioteko, ktp. estas je dispono.

Necesas la scipovo de la lingvoj

Esperanto kaj la germana.

Pagado laŭ interkonsento.

Ni atandas vian baldaŭan respondon.

*Peter Zilvar
Grubenhagenstr. 8, DE-37412
Herzberg am Harz, Germanio
Tel. + Fax: +49-5521-1363
Rete: zilvar@t-online.de*

MALLONGE

Ofte aperas en favora, centra loko en la surstrataj ekranoj de la Usona Biblia Instituto en la fama strato Broadway de New York la skriboj "La vorto" kaj la komenco de la biblio "En la komenco...".

Inter 08-16. 02. 2003 estas planata seminario por interesigantoj involviĝi en agadon pri infanoj kaj iĝi infangvidantoj de Internaciaj Infanaj Kongresoj. Interesigantoj kontaktu: David-Emil Wickstroem, rete: wicki@gmx.at.

Estis inaŭgurita nova ZEO en placo Esperanto en Karagmatatubo, norda marbordo de provinco San Paulo ĉe Brazilo la 28-an de aprilo. La artaĵo-skulptaĵon faris Juliano Junqueira, laŭmendo de Karagmatatuba Esperanto-Grupo.

Hans Bakker, esperantisto, fame konata pro Afrika Agado, ricevis honorigon "Ĉevaliro" en la Ordo de Oranĝo-Nasovo. La transdonado okazis en urbodomo de Amsterdamo, Nederlando. La medalon s-ro Bakker ricevis por socia agado, kampanjo "Amik' en Afrik".

Urbestro de kroatia urbo, Kostrena, Miroslav Uljan la 2-an de majo 2002 akceptis delegacion de Esperanto-Societo Rijeka por informiĝi pri Alp-Adria Konferenco, Mezeŭropa Konsultiĝo kaj Konkurso pri Esperanto de lerneĵanoj.

Kroata Esperanto-Ligo petis financan helpon de Usona Ambasado en Kroatio por kovro de vojaĝkostoj el Usono al Kroatio por Humphrey Tonkin en oktobro 2002. Tonkin prelegus en oktobro en Universitatoj de Zagreb kaj Split pri Shakespeare kaj prezentus la libron Eseoj omaĝe al d-ro Ivo Lapenna en la Jura Fakultato kie Lapenna instruis kaj konigus sian libron pri la vivo de familio Soros en Budapeŝto dum la Dua mondmilito.

La Baden-Vurtembergia Esperanto-Ligo, BaVELO, landa organizo de Germana Esperanto-Asocio, okazigis la 27-an de aprilo 2002 sian jarkunvenon en Konstanz.

Estas aĉetebraj en aparta angulo "Budo Esperantista" Esperantaĵoj en populara librovendejo "LEYP" en Valensa, Brazilio. La afero estas parto de kampanjo de Brazila Esperanto-Ligo, BEL.

INSTRUADO, ILEI

AIS-SESIO DUM LA 3-A AZIA KONGRESO, 2002, SEULO

Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, AIS, oficiale registrita en la Respubliko de San Marino, okazigas fakajn konferencojn, kursojn kaj ekzamenojn por titoloj de bakalaŭro, magistro kaj doktoro.

AIS-sesio (3 kursoj) okazos unua foje en Azio dum la 3-a Azia Kon-



greso de Esperanto, inter 23-26. 08. 2002, en Seulo, Koreio, en la kongresejo. La prelegantoj estas bone konataj profesoroj en koncernaj fakoj. La kursano ricevos atestilon po ĉiu kurso, kio validas 1 studunuon, se la kursano aliĝas kiel AIS-studento.

Okazas prelegoj pri "Informateorio kaj Komunikadkibernetiko", "Socialismo kaj Ekonomia Evoluo", "Nova Progreso en Medicino por Mensmalsano",

Pliaj informoj ĉe:

*ADoc. Mag Joanna Lewoc
Karl-Schwarzschild-Weg 6/317
DE-37077 Göttingen, Germanio
Rete: blewo1@hrz.uni-paderborn.de*

RADIO

POLAJ ELSENDOJ

Esperanto-Redakcio de Radio Polonia dissendas ĉiutage sian elsendon je 13:30 h (laŭ la Universala Tempo) (41 m 7285, 7275 kHz) kun la ripetoj je 18:00 h (42.07 m. = 7130 kHz), 19:00 h (nur satelite) kaj la sekvan tagon je 09:30 h nur per satelite. (Ripeto de la programo dissendita la antaŭan tagon). Post la

ripeto je 09:30 la elsendo estas aŭdebla en reta versio. La satelita ricevo estas ebla per: Eutelsat II F-6 - Hot Bird - 13 gradoj de la orienta latitudo; frekfenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz.

La adreso por retaj aŭskultantoj: <http://www.wrn.org/ondemand/poland.html>.

*E-Reakcio de Radio Polonia
Rete: esperanto.redakcio
@radio.com.pl*

LIBROJ

VORTAREGO ESPERANTO-GERMANA

La ĝis nun supozeble plej granda iam ajn eldonita vortaro Esperanto-nacia lingvo aperis en 1999. La prestiĝa lingvistika eldonejo Helmut Buske Verlag Hamburg aperigis la vortaregon. La 882-paĝa, klarlitere kaj dense presita vortaro enhavas pli ol 80 000 artikolojn kaj lingvajn esprimojn en Esperanto kun siaj germanaj ekvivalentoj. La vortaro havas dulingvajn antaŭparolojn (germana, Esperanto), instrukciojn pri la uzo de la vortaro, listojn de mallongigoj kaj uzita literaturo. La lingva materialo konsiderinde su-



peras tion de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV).

La Vortaro ne nur registras la ĉiutagan lingvon, sed ankaŭ prezentas multan faklingvan materialon el plej diversaj sciencaj kampoj. La vortaro sendube estas utilega ankaŭ por nekonantoj de la germana lingvo. Ĉiu serioza germana esperantisto devus posedi tian vortaron, se li/ŝi vere volas kiom eble plene eluzi kaj majstri la lingvon.

La nova libro estos havebla kontraŭ ĉ. 78 markoj (ĉ. 39 eŭroj) ĉe UEA aŭ aliaj libroservoj. Oni ankaŭ povas rekte mendi ĉe la eldonejo, kiu liveras en ĉiujn angulojn de la mondo:

*Helmut Buske Verlag
Richardstr. 47, DE-22081 Hamburg
Rete: buskepubl@aol.com*

ANONCETOJ

La 1-an de marto 2002 ĉesis funkcii la eldonejo Bambu Ltd, Varna, eldonejo de la revuo AmUzE. Sabira Stahlberg forlasis Bulgaron pro nova laboro komence de marto kaj estas atingebla provizore nur rete.

Nova retroŝta adreso de la franca-hungara komputila firmaeto, AbonaSoft estas: abonasoft@pro.hu.

La 21-an de februaro forpasis Manfred Föhler (nask. 1933), longtempa libroservisto de Germana E-Asocio, peranto de revuoj kaj lastatempaj instruistoj en interretaj kursoj. Li estis ankaŭ membro de la delegita reto de UEA por Eschborn kaj gastiganto de Pasporta Servo en Germanio.

KORESPONDADO

46 j. komencanto. Intereso: danco, muziko (Rock n roll, Blues, Jazz, Country), naturo-protektado. Adreso: Guy Philippe, 5, Route Nationale, FR-25220 Roches lez Beaupre, Francio.

44 j. kemiistino. Intereso: historio, turismo, alpinismo, muziko, gobelinoj. Adreso: Dochka Dolapchieva, Bol. "Nikola Petkov" 13, Ap. 48, BG-6100 Kazanlak, Bulgario, rete: d_dolapchieva@hotmail.com.

Instruisto. Adreso: Luis Cordova, Copilco 300, ed 12, dep 4, Col Copilco Universidad, 04360 Del Coyoacan, Mexico DF, Meksikio, rete: luismexicali@hotmail.com.

46 j. tradukisto. Intereso: pianoludado, klasika muziko, literaturo, sciencfikcio, verki esperante, aliaj kulturoj. Adreso: Paul Hanks, 36 impasse Jean Guehenno, FR-42153 Riorges, Francio, rete: galt42@aol.com.

19 j. fraŭlo. Intereso: poezio, biciklo, fotografio, piedpilko, filozofio, lingvoscienco kaj gitaro. Adreso: Alexandre Gravel-Raymond, 6645 Wilderton, Montrealo, Kebekio, Kanado H3S 2L8, rete: alex_grrr@iquebec.com.

20 j. studentino. Intereso: muziko, vojaĝado, alilandaj kulturoj. Adreso: Zanja Manojlović, Drage Tojic Gange 5, BA-49000 Brcko Distrikt Bosnio kaj Hercegovino, rete: zanjulino@yahoo.com.

70 j. pensiulo. Intereso: filmoj, ludi golfon, kaj legi librojn. Adreso: Makoto Honda, poŝtonombro 273-0852 2-2-29-303 kanasugi-dai, Funabashi, Chiba, Japanio, rete: honda0113@mx9.tcn.ne.jp.

58 j. instruistino kaj 56 j. instruisto. Intereso: legado, vojaĝado, dokumentaj filmoj, ĉirkaŭdomaj laboroj. Adreso: Berthe Choulet, Le Mont Bichoux, FR-25640 Villers Grelot, Francio.

Ni ludu!

SUPERFLUJAJ LITEROJ

Kion oni povas fari se unu litero mankas al la antaŭa vorto?

Oni povas krei novan vorton:

- broso - roso;
- bruli - ruli;
- disko - kiso;
- dogmo - domo;
- kurso - urso;
- okulo - kulo;
- kvadranto - kvadranto
- kastro - stari;
- kerno - reno;
- kovri - kovi;
- koliko - kliko;
- komploto - kompoto;
- konto - koto;
- floro - rolo;
- foiro - orfo;
- frako - fako;
- kora - ora;
- formo - moro;
- fonto - foto;
- formala - morala;
- frazo - razo;
- fulmo - ulmo;
- fulmo - lumo;
- fumo - umo;
- forno - fono;
- marĉo - maro;
- maĉo - amo;
- masko - sako;
- meblo - melo;

el Infosel, febr/2001

LONGECO

- Kial vi ŝatas la malpli longajn historiojn

- Ĉar ili estas la plej mallongaj

el Anekdotoj-en-Esperanto

EVENTOJ, Njt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X
 A szerkesztőség címe: HU-1675 Budapest, pf. 87.
 Tel./fax: 282-88-85. E-posta: eventoj@esperanto.org
 http://www.eventoj.hu/
 Megjelenik kéthetente.
 Nyomás: SZELKER Bt. HU-1149 Bp, Fogarasi u. 17/A
 EVENTOJ, internacia gazeto pri la Esperanto-movado,
 en kunlaboraj rilatoj al Hungara E-Asocio.
 Eldonas LINGVO-Studio. Redaktas: Axel Ország-Krysz
 Oficeja kunlaboranto: István Mészáros.
 Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro: László Szivási.
 La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj
 artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.
 Abonkotiĝo: 34, aere 40 EUR al la UEA-kodo ELLS-S.

TAGOJ DE LA SEMAJNO

Kiam oni parolas pri la unua tago de la semajno, la angloskala kulturo konsideras ke ĝi estas dimanĉo, la mediteraneaj landoj diras, ke ĝi estas lundo kaj por la muzulmanoj, ĝi estas sabato. Defini tion kio estas tago ne estas fa-

cila, ĉar la koncepto de tago kiel dudek kvar horoj estas moderna, kaj multaj lingvoj, anstataŭ adopti tute novan vorton por priskribi tiun periodon, daŭre uzis la vorton "tagon" - kiu, por pli multaj el ili komencis kiam la suno aperia kaj, do, ĝia daŭro variis je la malsamaj epokoj de la jaro.

La anglaj kaj germanaj nomoj por tagoj de la semajno devenas el Skandinavio, kie origine kvin-taga semajno estis uzita. La skandinavoj bazis sian mitologion sur la greka kaj romia -tiel, Woden kaj Merkuro ambaŭ estis dioj de la milito, kaj Friggs kaj Venuso, ambaŭ diinoj de la amo. Hodiaŭ, en Islando, Svedio kaj Danio, sabato ankoraŭ estas konata kiel "bantago" (Laugardagur, Loerdag), ĉar kelkaj triboj ne povis trovi teŭtonikan ekvivalenton por la romia honorado al Saturno - la dio de la agrikulturo. La

Aprilo 2002							Eventoj
Lundo	Mardo	Merkredo	Ĵaŭdo	Vendredo	Sabato	Dimanĉo	
1	2	3	4	5	6	7	
8	9	10	11	12	13	14	
15	16	17	18	19	20	21	
22	23	24	25	26	27	28	
29	30	31					

INTERESE

problemo estis solvita kiam ili vidis ke la romiaj soldatoj baniĝis je tiu tago!

La sep taga semajno devenis el okcidenta Azio, ĝi disvastiĝis al Eŭropo, kaj poste al norda Afriko. En aliaj partoj el Afriko, oni trovas tri, kvar, kvin, ses kaj ok tagajn semajnojn. La nombro de la tagoj korespondas al la nom-

bro de malsamaj merkatoj je malsamaj tagoj en unu areo, fakte, longa vorto por "semajno" estas la sama kiel por "merkato".

Ne ĉiuj lingvoj havas specialajn nomojn por la tagoj de la semajno. En aliaj multaj Afrikaj lingvoj, ekzemple Svahila, ili simple diras "unua tago", "dua tago", ktp. Tamen, ilia unua tago ne ĉiam korespondas al nia unua tago, kaj ĝi ofte estas sabato. Plimultaj antikvaj civilizacioj - egipta, babilona, majaa, ĉina ktp. - ne havis koncepton de semajno, kontraŭe, ili havis ciklojn de tagoj - dudek tagoj por la majaa kaj la aztekaj, anstataŭ la Eŭropaj sep tagoj.

Maria José Alvarez Faedo

ĈU ANGLIĜONTAJ GAZETOJ?

Multaj anglalingvaj gazetoj favore komentas la decidon de la gazeto "Le Monde" - ofte konsiderata kiel referenca en Francio - aperigi kromajn paĝojn el "New York Times", dum protestoj de legantoj venas amase, ne nur el Francio, kontraŭ tiu decido. Estas evidente ke tiu devojiĝo, se ĝi restos sen energia rebato, instigos ankoraŭ pli al ĝenerala angligo de la tuta mondo kaj al ties vasaligo. Certe aliaj amasinformiloj observas la evoluon de tiu iniciato.

Germana leganto, kiu nuligis sian abonon al "Frankfurter Allgemeine Zeitung", skribis i.a.: "Mi ĵus eksciis ke Le Monde aperigas usonlingvan suplementon por plue puŝi la kompletan usonigon kiun ni eltenas nun en Eŭropo kaj en la tuta mondo

(...) Mi ne estas preta subteni tiun katastrofan tendencon per mia mono. Mi konsideras la internacian usonan kiel la malamikon n-ro 1 de la multlingveco, de la multkultureco kaj de la lingva justico (kiu estas Homrajto)..."

"Le Monde" sentis sin flatita ke la tre konservativa gazeto "The Daily Telegraph" dediĉis atenton pro tiu decido en sia editorialo, en la franca, de la 5-a de aprilo! Ĝi eĉ fieris pro tio ke tiu gazeto - kiu malestimas la francojn! - aludis en sia titolo pri nova "franca revolucio"!

Reagoj estas bonvenaj, precipe adresitaj al:

Jean-Marie Colombani
Le Monde

21 bis, rue Claude-Bernard. FR-75242 Paris Cedex 05, Francio